001(082) = 089.2

## SCIENCAJ STUDOJ - NUNA STATO

### Komuniko al ĉiuj membroj kaj amikoj de I.S.A.E.

La materialo por la aperonta volumo da originalaj traktaĵoj verkitaj en Esperanto abundas kaj konsistigos science altnivelan publikigaĵon. La redaktoro de la volumo timas, ke fine alvenos pli da materialo ol estos eble presigi laŭ la akceptita projekto (t.e. ĉ. 250 paĝoj). Montriĝis granda intereso inter la sciencistoj pri tiu ĉi jubilea libro, kiu povos fariĝi la unua volumo de konstanta scienca periodaĵo, se la ĝenerala esperantista publiko efike subtenos la entreprenon.

### Al ĉiuj Esperanto-gazetoj.

La reklamado por la volumo en la Esperanto-gazetaro estis ĝis nun absolute nesufiĉa. Tiu ĉi alvoko celas atingi la necesan subtenon flanke de niaj gazetoj! Precipe estas tre grave, ke ankaŭ **ĉiuj landaj Esperanto-gazetoj priparolu la aferon,** atentigante la legantojn pri la unika graveco de la entrepreno. **Oni bonvolu represi el la prospekto,** kiu estas aldonita al tiu ĉi kajero de S.R., kaj el la **suplementaj informoj** pri Sciencaj Studoj, donitaj en ĉi tiu kajero.

Por simpligi la mendadon, ne nur pagoj, sed ankaŭ mendoj povas nun esti direktataj al la kasisto de la entrepreno, s-ro farm. kand. **Vagn Jørgensen,** Martinus Rasmussensgade 21, Nyborg, Danujo. **Poŝtkonto 215.12** — ne forgesu klare skribitan nomon kaj adreson de la mendanto kaj destinon de la pago. Se estas tro malfacile pagi el la lando de la mendanto al Danujo **oni bonvolu pagi al la landa delegito de ISAE** — la asocio poste aranĝos la transpagon (vidu la liston de la landaj delegitoj sur la dorsflanko de la kovrilo).

### La libro aperos.

Je la nuna momento la entrepreno ricevis tiom da ekonomia garantio pere de la aktiva intereso de la esperantista publiko, ke la minimuma sumo por decidi pri la aperigo estas certigita. Kiom ĝojiga tiu fakto estas, tamen tio ne signifas, ke ĉiuj kostoj per tio estas kovrataj, kaj ni ege bezonas ankoraŭ multajn mendojn. La legantoj bonvolu kontakti ĉiujn eblajn interesotojn por informi ilin pri la entrepreno kaj igi ilin tuj mendi la libron.

Atentu, ke **la prezo ĉe antaŭmendo estas favorprezo. La definitiva prezo estos konsiderinde pli alta.** I.S.A.E.



001(082) = 089.2

## ŜANĜOJ EN LA TEMOJ MENCIITAJ EN LA PROSPEKTO

W a r i n g h i e n verkis pri: *Ĉu vortstatistiko sufiĉas por la starigo de bazvortaro?* kaj S e t ä l a faris traktaĵon pri la temo: *Kategorioj de vortoj, glosoj, radikoj.*

### Kontribuaĵoj anoncitaj krom tiuj menciitaj en la prospekto.

Prof. M. F r é c h e t, Parizo, traktaĵo pri matematika problemo; profesoro E. B a l e c h, Argentino, pri: *Biooceanografiaj studoj en Argentino.* El Japanujo kontribuas prof. K a w a m u r a per traktaĵo pri *Sukeroj de kelkaj japanaj legumenoj,* prof. T s u m u r a pri *Oportuna fotomikrografia aparato,* kaj s-ro H a r u o H a s i m o t o, direktoro de silkraŭpokultura esplorinstituto, pri *Seksdeterminado ĉe la morusa silkraŭpo,* d-ro S u g i m u r a pri Zona distribuo de geologiaj kaj geofizikaj fenomenoj. D-ro N ij v e l d, Amsterdam, verkis pri *Praktika uzado de kolorsistemoj, precipe en farbindustrio,* dum d-ro D u n c a n verkas pri la mezurado de odoroj.

Prof. A d c o c k, Victoria Univ., Novzelando, sendis psikologian traktajon: *Percepta defendo kaj subcepteco,* dum prof. K a w a s a k i, Akad. anoncis artikolon pri *Zamenhofa koncepto pri konsonantkombino.*

La volumo estos vere bele presita; ĝi enhavos plurajn ilustraĵojn, i.a. portretojn de la iamaj kaj nuna prezidantoj de la jubileanta asocio.

La nuna prezo validas nur ĉe antaŭmendo, la prezo estos konsiderinde pli alta post la apero de la verko.

001(082) = 089.2

## „SCIENCAJ STUDOJ"

Jen gravega atingaĵo de nia asocio, kaj de nia movado entute: ISAE eldonas memstare pure sciencan verkon. Tio estos historia momento por Esperanto-movado kaj ni povas esti fieraj ke ĝi estas ligita ĝuste kun la 50-jara jubileo de ISAE. Pro tio ni devas klopodi ke la verko trovu sian lokon en la bibliotekoj de ĉiu esperantisto-sciencisto, de ĉiu sciencisto simpatianta esperanton kaj de ĉiu fervora esperantisto.

Krome, kaj ĉefe, ni devas trovi la vojon ke la verko venu al ĉiuj sciencaj bibliotekoj kiuj kolektas sciencajn librojn, senkonsidere la lingvon en kiu la libro estas skribita. Ĉiu kiu havas ian ajn kontakton kun tia biblioteko devas klopodi ke la biblioteko antaŭmendu aŭ aĉetu la libron. Neniu esperantisto hontos post ĝia apero pri ĝia enhavo kaj ĝia aspekto. Pri la enhavo garantias la nomoj de la plej eminentaj esperantistoj-sciencistoj kaj la aspekton ni jam vidis dum la kongreso: vere impona grandformata libro sur bela kaj dika papero. La prezo ankaŭ estas malalta, ĉar similaj nacilingvaj libroj kun scienca enhavo kostas kutime pli ol 1 angla pundo.

La libro „Sciencaj studoj" estos tre utila por propagando inter sciencistoj, ĉar ĝi klare montros al ĉiu ke esperanto jam kapablas por verkado en ĉiuj sciencaj branĉoj. Tiu fakto multe pli utilos ol plej bona pervorta propagando. Pro tio utiligu ĝin fervore.

La titolo „Sciencaj studoj" estas provizora kaj ĝi restos nur se ni ne trovos pli konvenan titolon. Se vi trovos pli bonan titolon bonvolu proponi ĝin al la redaktoro d-ro Neergaard (Gothersgade 158, Kopenhago) aŭ al kiu ajn estrarano de ISAE.

La libro certe aperos, ĉar jam dum la kongreso kaj tuj post la kongreso alvenis ĉ. 150 antaŭmendoj. Tuj mendu: ja profitu la rabatitan antaŭmendan prezon de 18 danaj kronoj. Krome la eldonkvanto dependos de la nombroj de antaŭmendantoj kaj pli granda eldonkvanto estos nepre pli granda sukceso!

La antaŭmendojn kaj la monon oni sendu al la dana delegito V. Jørgensen, Martinus Rasmussensgade 21, Nyborg, poŝtkonto 21512.

B. Popoviĉ.

655.4/.5 : 001(02/09) = 089.2

## LA FONDAĴO „SCIENCO"

Koncerne la fakan literaturon Esperanto-movado troviĝas en la evoluperiodo kiu postulas aperigon de la artikoloj, libroj, fakterminaroj, ktp. kiuj ne havos multajn legantojn kaj eĉ malpli da aĉetantoj. Speciale la fakterminarojn oni povas eldoni en nur malgranda kvanto, ĉar la lingvo rapide evoluas sciencflanke kaj la terminaroj rapide malnoviĝos. Krome la eldonistoj ankoraŭ ne ŝatas transpreni la riskon por eldoni fakan esperantan libron, pro kio ni bezonas propran bazan kapitalon. De kie ni havigu ĝin? Kompreneble en la nuna situacio precipe de esperantista popolo.

Jen kial la estraro de ISAE decidis krei la fondaĵon „Scienco" kaj la jarkunveno en Kopenhago akceptis ĝian regularon:

1. La fondaĵo „Scienco" estas kreita kiel helporgano de ISAE por la celoj de la paragrafo 2 kaj ne povas esti utiligata por aliaj celoj.
2. La celoj de la fondaĵo estas:
   a. subvencii eldonadon de fakaj nepolitikaj libroj kaj terminaroj,
   b. helpi aperigadon de esperantaj fakrevuoj.
3. La elspezoj el la fondaĵo povas esti farataj nur post la decido de la ISAE-estraro. Nur en urĝaj okazoj oni povas fari la elspezojn ĝis 100 steloj post interkonsento de du estraranoj, kondiĉe ke la estraro tion poste aprobu.



Esperantistoj estas kutime neriĉaj, ofte eĉ malriĉaj homoj. Sed brikon post briko oni faras la domon. Krome tamen inter ni troviĝas ankaŭ finance bonstataj homoj, kiuj komprenos ke penetro de Esperanto en diversajn sciencajn branĉojn estas en la nuna momento la plej grava tasko de nia movado. Kaj tiu penetro estos tro malrapida sen la financa bazo. Kontraŭuloj utiligas tion kaj provas subfosi entute la ideon de internacia lingvo financante Interlingua-n. Ni scias ke ili ne povas malebligi la historian evoluon kaj haltigi la progreson de Esperanto, kiu estas la sola esence internacia lingvo. Sed ni scias ankaŭ ke ili povas fari malfacilaĵon, malrapidigi la evoluon, se ni ne havos propran financan bazon. Kaj pro tio ni kreas ĝin kaj ni konstante plifortigados ĝin. Ĉiu helpo en tiu direkto, eĉ tre malgranda, estos kun danko akceptota.

La monon por la fondaĵo sendu provizore nur al s-ro *S. Alexandersson,* Ulricehamnsvägen 16 n.b. JOHANNESHOV, Svedujo, *poŝtĝiro 190976.* La delegitoj estas petataj kolekti la donacojn.

Ĝen. sekretario B. Popoviĉ.

061.22 (ISAE)„1906/1956".053.7„1956.08.07"(489)

## JUBILEA KUNVENO DE I.S.A.E.

(Laŭ *„Esperanto"*, septembro, 1956).

Internacia Scienca Asocio Esperantista okazigis mardon matene en la salono Zamenhof specialan aranĝon por festi la 50-jaran jubileon de sia ekzisto.

Unue la trio *Esther Vagning* (piano), *Erik Thomson* (fluto) kaj *Mogens Steen Andreassen* (hobojo) kun multe da arta gusto ludis la sonaton de Johann Quantz. Poste *Poul Thorsen* deklamis sian Prologon, kiun ni aperigas en tiu ĉi numero de la revuo. La Vicprezidanto de I.S.A.E., Muzea Kuratoro *C. Støp-Bowitz* bonvenigis la multnombrajn ĉeestantojn kaj akcentis, ke la scienco, same kiel la muziko, estas universala kaj tial ĝi bezonas komunan lingvon. Li informis, ke I.S.A.E. eldonos, okaze de sia jubileo, verkon de ĉ. 250 grandformataj paĝoj. Ĝia provizora titolo estas „Sciencaj Studoj", kaj en ĝi promesis kunlabori per originalaj kontribuaĵoj multaj sciencistoj-esperantistoj.

*D-ro Paul Neergaard,* la ĉefa organizinto de la festo, prezentis la evoluon de I.S.A.E., kiu estis fondita dum la Dua Universala Kongreso de Esperanto en Ĝenevo. Inter la fondintoj estis la fama franca specialisto pri balistiko, generalo Sébert. Internacia Scienca Revuo, kiu poste fariĝis organo de la Asocio, komencis aperadi jam du jarojn antaŭ la fondiĝo de I.S.A.E., nome en 1904. Multaj sciencistoj publikigis en ĝi diversajn traktaĵojn, el kiuj unu el la plej gravaj estis tiu de la fama svisa entomologo kaj seksbiologo August Forel.